

ESPERANTO JUNAS EN FRANCO

JeunEsperanto

info



Magazine de l'association JEFO

JEFO informas • Bimestriel • Janvier - Février 1997 • n° 97/1 • 25 FRF

Nova informilo!




Découvrez à l'intérieur de ce numéro le nouveau document d'information en couleurs édité par Jefo.

ISSN : 265 3853

www.worldnet.fr/~mjb/jefo

Tout
savoir
sur J@fo

3615 ESPERANTO 1,29 Ffr



> **Kalendaro**

(Agenda des rencontres)



L'espéranto est une langue morte ?

Non, elle est bien vivante dans la bouche de jeunes qui s'en amusent. Et que faire d'une langue sinon s'en servir pour plaisanter, s'amuser, discuter entre amis dans une ambiance détendue ? C'est ce que vous propose JEFO (les jeunes espérantophones français) au cours de la Fromağa Semajfino (FĝS pour les initiés, le Vécande Fromage™ en français). FĝS est la prochaine rencontre gastronomique dans la lignée de la Mustarda Semajfino (moutarde) et de la Ĉokolada Semajfino (chocolat).

Mais pourquoi en espéranto ?

Simplement pour accueillir nos amis étrangers dont nous ne parlons pas la langue et qui ne maîtrisent pas la nôtre. Chacun fait un petit effort linguistique et se fait un énorme plaisir à découvrir des secrets culinaires et à préparer des recettes ensemble. Comme pour la ĈS, nous éditerons un recueil des recettes de la FĝS, dont vous pouvez devenir un co-auteur en nous envoyant tout de suite votre meilleure recette avec du fromage.

Envie de découvrir le dynamisme des espérantophones, d'élargir votre horizon gastronomique ou de partager une bonne tranche de rigolade :

Venez à Grenoble du 4 au 6 avril 1997 (du vendredi soir au dimanche soir).


> MARTO

28 - 31: Paska renkontiĝo en Vught (Nederlando)

☞ aliĝilo en *Jl n-ro 96/4*

26 - 01/04: Internacia Junulara Festivalo en regiono Liguria (Italio)

> APRILO



04 - 06: Fromağa semajfino en Grenoblo (Francio)

☞ aliĝilo en *Jl n-ro 96/4*

> MAJO

13 - 16: Eŭropa Junulara Parlamento, kaj

16 - 19: Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart (Germanio)

☞ aliĝilo en *Koncize n-ro 121*

> JULIO

19 - 26: 82a Universala Kongreso (UK) en Adelajdo (Aŭstralio)

24 - 31: 53a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Assisi (Italio)

☞ aliĝilo en *Koncize n-ro 121*

> AŬGUSTO

01 - 07: FESTO la dua en Saint-Raphaël (Francio)

☞ aliĝilo en *Jl n-ro 96/4*



☞ Por pli da informoj / Pour plus d'informations :

INTERNET : <http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo>

MINITEL : 3615 ESPERANTO (1,29 FRF/minute)

> **Enhavo** (Sommaire)

JEFO freŝe
lastaj novaĵoj pri via
preferata asocio
P. 4

Malesperantio
ili pri ni
P. 6

Agadraporto '96
kion ni faris dum la
ĵus pasinta jaro?
P. 7

Financa raporto
'96
ĉu ni havas monon
en la kaso?
P. 11

Kroataj infanoj
kristnaskmesaĝo de
la kroataj infanoj
P. 12

Kurso
ĉu vi volas lerni
Esperanton?
P. 13

Assas
salono pri kontraŭ-
faŝistaj libroj
P. 17

Esperantio
raporto pri la diversaj
aranĝoj okazintaj
pasint-somere kaj
vintre
P. 18


Minaco al PS
franca leĝo ĝenas
uzadon de Pasporta
Servo en nia lando
P. 23

Anoncoj
diversaj anoncoj kaj
lastminutaj informoj
P. 25



Vous êtes nouveau ?

Regardez au dos de la revue : notre association se présente !



> **Enkonduko**..... (Éditorial)

Ĝante redaktoro de **JEFO informas**, mi donis al mi tri celojn: ① informi pri kio okazas en Esperantio, ne nur en Francio, sed ankaŭ eksterlande, ② distri, ③ ebligi al ĉiuj plibonigi sian nivelon de la internacia lingvo.

Plaĉi al ĉiuj ne estas facila tasko se oni konsideras la diversecon de la legantaro: de la "novbakitoj" (kelkaj eĉ malkovras Esperanton dank'al tiu ĉi revuo) ĝis la "veteranoj" kiuj jam partoprenis multajn renkontiĝojn. Por ke ĉiuj povu trovi siajn interesoĵojn, la engaĝigo ŝanĝiĝis: ĉiuj tekstoj estas nun en Esperanto, sed ĉiam kun resumo en la franca, kelkaj estas eĉ dulingvaj. Krome aldoniĝas porkomencantaj informoj en la franca kaj kurso aperas.

Finfine vi trovos numeron pli riĉa ol antaŭe. Mi esperas, ke vi ŝatos ĝin.

Bonan legadon al ĉiuj!



*En devenant le rédacteur de **JeunEspéranto info**, je me suis fixé trois objectifs : ① informer de ce qui ce passe dans le petit monde de l'espéranto, tant en France qu'à l'étranger, ② distraire, ③ permettre à chacun d'améliorer son niveau dans la langue internationale.*

Satisfaire tout le monde n'est pas une tâche facile quand on considère le caractère très diversifié du lectorat : des « tout nouveaux » (certains découvrent même l'espéranto par cette revue) jusqu'aux « vieux routiers » qui ont déjà participé à bon nombre de rencontres. Pour que chacun puisse s'y retrouver facilement, la maquette a été modifiée : tous les textes sont dorénavant en espéranto, mais ils sont systématiquement résumés en français, certains sont même bilingues. À cela s'ajoutent des informations en français « spéciales pour novices » et un cours en plusieurs parties fait son apparition.

Au total, vous trouverez un numéro plus riche qu'avant. J'espère que vous l'apprécierez.

Bonne lecture à tous !

Tony

La venonta numero aperos ĉirkaŭ la 15a de Aprilo,
sendu viajn kontribuojn antaŭ la 29a de Marto.





> JEFO freŝe

(Quoi de neuf chez JEFO ?)

>INFORMADO

Komisiono "Informado"

(La commission information d'UFE/JEFO s'est réunie au siège pour discuter de l'avenir des documents d'information communs aux deux associations)

Tiu komisiono kunvenis la 25an de Januaro en la sidejo. En ĝi partoprenis membroj de UFE kaj de JEFO. La celoj difinitaj de la estraro de UFE kaj aprobitaj de JEFO estas:

- ① difino de la bezonoj pri informmaterialo, laŭ la uzoj kaj la bezonoj,
- ② ekzameno de la ekzistantaj dokumentoj por daŭre uzi / ĵeti / elĉerpi la stokojn / reldoni / modifi...

③ pripensado de la efiko de la *Lettre de l'espéranto*.

✉ Bruno

TTT-paĝoj

(Des nouveautés sur notre serveur WEB: des extraits de cette revue ainsi qu'un nouveau cours font leur apparition)

De pluraj semajnoj la TTT-ejo de JEFO proponas al vi novajn dosierojn. Unue elĉerpaĵoj de via ŝatata bulteno fariĝis rete konsulteblaj kiel prov-ekzemplero de la tipa enhavo de JI. Due, apud la jam ekzistantaj du kursoj, antaŭ nelonge aperis la plena kolekto de Claude Piron "Lasu min paroli plu!". Temas pri kolekto

de legaĵoj paralelaj al la ĉapitroj de "Gerda malaperis!".

Alia projekto estus elangligi por franclingvanoj novan TTT-an kurson de Esperanto. Temas pri facila babilado pri-movada kaj pri-lingva. Iom post iom la aŭtoro, Ian Fantom, el Britio, enkondukas la lingvon, sur fono de fotoj kaj dialogoj, kiuj donas allogan kaj modernan bildon pri la movado. Ĝis nun nur unu leciono (el dek) estis tradukita kaj la projekto haltis atende de aldona laborforto.

✉ Marc (<mjb@worldnet.fr>)

>LOKA AGADO

Grenoble

(Une nouvelle émission sur l'espéranto sur une radio étudiante de Grenoble, c'est tous les mardis à 13 heures sur 90.8 MHz)

Ekde la 21a de Januaro, okazas ĉiusemajna elsendeto ĉe loka studenta radio **BRUME 90.8** en Grenoble. Tiu regula elsendeto prezentos al la juna aŭskultantaro la lingvon, la kulturon, la movadon kaj ankaŭ la muzikon. Ĉiusemajne, oni traktos alian temon ligitan al Esperanto: unuaj idealoj por ĝia kreo, nunaj renkontiĝoj de junuloj, la Pasporta Servo, solidarecaj projektoj k.a. Ĉiun temon oni ilustras per kanto de niaj originalaj grupoj aŭ de la Vinilkosmo-Kompilaĵoj. Vi povos aŭskulti tiun kvin-minutan elsendeton ĉiumarde je la 13a.

✉ Alain



Une langue haute en couleurs

L'espéranto est tout sauf une langue terne. Déjà, sa prononciation la rapproche des langues les plus « colorées » et les plus « chaudes » que sont l'italien et l'espagnol et ses locuteurs des cinq continents constituent une population véritablement multicolore. Alors pourquoi persister à communiquer sur l'espéranto en noir et blanc ? JEFO change de ton et suit les initiatives des autres grandes associations de jeunes espérantophones qui ont déjà édité des dépliants en couleurs.

L'obstacle financier a été franchi, grâce à une gestion économe depuis plusieurs années et au soutien renouvelé des parrains de l'association (merci à eux !).

Côté technique, les conseils avisés d'une professionnelle de la PAO, Corinne Marion, ont permis de créer un document adapté aux lois d'une communication efficace, souvent ignorées par le néophyte. L'information étant aujourd'hui omniprésente et le public sur-sollicité, on ne peut plus se contenter de « bricolages » qui, bien que souvent réalisés avec la meilleure des volontés et d'un contenu généralement excellent, provoquent l'effet contraire à celui recherché, en donnant une image démodée et dépassée de l'espéranto.

Et, après avoir reçu les premières réactions positives d'autres associations, gageons que nous n'en resterons pas là et que d'autres documents « à la hauteur » vont bientôt paraître.



Paris

(Un nouveau cours d'espéranto sur Paris)

De kelkaj semajnoj, esperantista fako kreigis en la sindikato CNT. Ĉiun mardon okazas kursoj de la 19a ĝis la 20a en la pariza sidejo. Tiuj kursoj funkcias laŭ la memregada principo: dum la lecionoj, iuj estas siavice instruistoj kaj lernantoj. La komencantoj estas gvidataj de la pli spertaj.

Diskutoj en Esperanto estas organizitaj kaj ankaŭ korespondoj kun esperantistoj el aliaj landoj. Ĝenerale la vesperoj finiĝas en apuda trinkejo, kie daŭras la diskutoj.

kontakto :

C.N.T. Esperanto-Fako
33, rue des Vignolles
75020 PARIS

(M°: Nation, Buzenval, Avron)
Tel : +33 (0)1 43 72 09 54
Fax : +33 (0)1 43 72 71 55
<<http://www.altern.com/cnt>>
<cnt@altern.org>

☞ Vanessa



Dijon

(Une présence du CUBE, le club d'espéranto de l'université de Bourgogne, sur un salon universitaire)

Jen raporto pri la paŝetoj de CUBE. Essendilène kaj Didje tenis budon okaze de tago de l'asocioj en la universitato de Dijon. Interesiĝis 15 gejunuloj, konigis sin profesorino, kiu jam lernis Esperanton, volis lerni du junulinoj kiuj sekvis sian unuan kurson la morgaŭon. Kaj ilin atendente la jaŭdon antaŭ la vintraj ferioj, Didje devis prezenti longe E-on al du junuloj el Nordafriko.

☞ Didje

>RENKONTIĜOJ

Franda kalendaro

(Le calendrier provisoire des prochaines rencontres gastronomiques)

Certa:

✓ 04-06 Aprilo 1997:
Fromaĝa Semajnfino (FĜS)

Planitaj en 1997:

✓ 27-29 Junio aŭ 04-06 Julio:
Ĉokolada Semajnfino 2a (ĈS2)
✓ 26-28 Septembro:
Krespa Semajnfino (KS)

Planitaj en 1998:

✓ 27-29 Marto aŭ 03-05 Aprilo:
Fiŝa Semajnfino (FŜS)
✓ 26-28 Junio aŭ 03-05 Julio:
Ĉokolada Semajnfino 3a (ĈS3)
✓ 25-27 Sept. aŭ 02-04 Okt.:
Funga Semajnfino (FS)

☞ Alain

FESTO

(Attention la date de FESTO approche à grand pas, et nous recherchons toujours des volontaires pour contribuer au programme)

Kiel vi jam scias FESTO okazos ĉi-somere en Saint-Raphaël. Ni ŝatus havi bonan kulturalan programon, iomete kiel en la tradicio de la rusaj tendaroj. Do se vi ludas muzikon, aŭ se vi ŝatus ludi en teatra grupo, konigu vin plej rapide. Ĉiukaze ni estas malfermaj al ĉiuj proponoj, do ne hezitu proponi ajnajn ideojn.

Kaj kompreneble, kiuj partoprenas la programon, tiuj ricevas rabaton!

☞ Tony



Le mot du président

Le monde au bout de la langue...

Tel est le slogan inscrit sur la couverture du nouveau dépliant d'informations en couleurs que vient d'éditer Jefo. Encore une étape franchie dans la progression de l'association. Espérons qu'elle portera ses fruits si l'on compte atteindre l'objectif (innocemment) fixé à 2000 adhérents à Jefo pour l'an 2000 ! Pas de temps à perdre... Le salon Expolangues a déjà inauguré la diffusion de ce document qui semble avoir séduit le public. Tous les détails de notre présence sur ce salon dans le prochain numéro.

Autre innovation avec ce (vrai) numéro de rentrée de JeunEspéranto info, un profond renouvellement de la mise en page et de l'identité visuelle de la revue. JeunEspéranto info doit être plus qu'un bulletin d'information interne à l'association. En tant que reflet de nos activités, de nos points de vue, de nos projets, il doit être une vitrine et se doit donc d'avoir une présentation à la hauteur.

Que ces changements vous enthousiasment ou vous déplaisent, exprimez-vous ! Nous pourrions apporter de nouvelles modifications au prochain numéro si besoin. Alors à vos plumes !

Jefonement vôtre,

Bruno





> Malesperantio

(Revue de presse)

> INTERNET

Recenzo

(En ce moment il y a une enquête sur les usagers d'Internet. Le formulaire se trouve sur <<http://www.netributes.com/census>>. Une question très intéressante est la langue préférée. Nous invitons tous les espéranto-phones à voter pour l'espéranto et aussi à faire voter leurs amis)

Nuntempe estas recenzo pri la uzantoj de Internet. La demando, kiu plej interesas nin, estas kompreneble tiu de la lingvo. Rimarkinde ke pluraj homoj respondis favore al Esperanto. Do se vi havas Internet-aliron, indiku ankaŭ vian preferatan lingvon ĉe: <<http://www.netributes.com/census>>.

Momente la rezulto jenas:
Preferata Lingvo
(870 Respondoj)

46.67%	Angla
40.34%	Esperanto
3.33%	Hispana
2.53%	Aliaj Lingvoj
1.84%	Rusa
0.92%	Germana
0.80%	Franca
0.80%	Portugala
0.46%	Nederlanda
0.34%	Finna
0.34%	Sveda
0.34%	Araba
0.23%	Hebrea
0.23%	Norvega
0.23%	Persa
0.11%	Ĉina
0.11%	Japana
0.11%	Itala
0.11%	Dana

Konkludi ke unu triono de la retanoj favoras al Esperanto estas paŝo kiun ni tamen ne faros!

Java

Ekzistas nova komputila programlingvaĵo nomata **Java**, kreita de usona kompanio **Sun** (Suno). Jen priskribita en la unua septembra numero de **01 Informatique**: "voilà qu'un langage de programmation vieux d'à peine un an, hâtivement repositionné comme l'espéranto du World Wide Web, vient contester l'hégémonie des vétérans de la guerre des objets: Java de Sunsoft" (Jen programlingvaĵo apenaŭ unujaraĝa, haste reklamita kiel Esperanto de TTT, venas kontraŭstarigi hegemonion de la veteranoj en la milito de objektoj). Kompanio Sun mem uzis la vorton Esperanto por priskribi sian novan kreitaĵon. Por ekkonigi tiun novan programlingvaĵon, samideano verkis manlibron en Esperanto ĉe <<http://www.panix.com/~kalb/lajava.htm>>.



> POLITIKO

FLORENCE: Vth "ESPERANTO RADIKALA ASOCIO" CONGRESS

Florence, June 22/23. The 5th Congress of the "Esperanto Radikala Asocio" (ERA)

* remembering the achieved successes:

- the Ministerial Circular 126, which for the first time provides complete information on Esperanto to all the Italian schools;

- the 105 schools in 29 countries worldwide connected through the Fundapax Project which has been approved and financed by the UNESCO;

- the approval and the financing of 55% by the European Commission of the Information Project on "The cost of (non) communication in Europe";

* in view of a realistic possibility to adopt Esperanto as an international auxiliary language, by 2005 and 2020 in all the countries in Europe and in the world;

* charges its responsables with the organization of a research campaign on the financial possibilities and the human resources.

Florence, La 22/23ajn de junio. La kvina kongreso de "Esperanto Radikala Asocio"

* rememore atingitajn sukcesojn:

- ministra cirkulero 126, kiu unufoje provizas kompletan informon pri esperanto al ĉiuj italaj lernejoj;

- la 105 lernejoj en 29 landoj rete konektitaj laŭ la Fundapax projekto, kiun aprobis kaj financis UNESKO;

- aprobo kaj financado de 55% far Eŭropa komisiono de informprojekto pri "kosto de (ne)komunikado en Eŭropo";

* vide realisman eblecon adopti esperanton kiel internacian helplingvon, en 2005 kaj 2020 en ĉiuj landoj de Eŭropo kaj en la mondo;

* komisiis siajn respondeculojn por organizado de serĉkampanjo pri financaj eblecoj kaj homaj rimedoj.

Tiun informon, ni ricevis en la angla. Ni tradukis ĝin en esperanton. Por ne riski erarojn, ni lasis la fontan anglan version.

Agad-raporto 1996

Jen noteroj pri la komitat-kunveno de JEFO, okazinta la 9an de Novembro 1996, ĉe la sidejo, en Parizo.

Tiu kunveno, iniciatita de Tony, estis bone preparita kun detala kaj ampleksa tagordo.

La kunsidon partoprenis 7 komitatanoj (el 11). Krome, Pascal estis doninta voĉdonrajton al Bruno. Ankaŭ ĉeestis ne-komitatanoj kaj eĉ ne-membroj de JEFO.

Do entute partoprenis: Agnieszka, Alain, Barbara, Crispin, Bruno, David, Didier, Evelyne, Guillaume, Laurent, Marc, Michel, Olivier, Philippe, Sandrine, Tatiana (verŝajne la plej juna inter ni!), Tony, Valérie.

Tiu kunveno estis ankaŭ okazo por la ne-Parizanoj admiri la refarbadon de la akcepto-ĉambro.

★ FINANCOJ kaj ADMINISTRADO

Dispartigo de la mon-profitito el FESTO

Diskuto okazas kaj diversaj argumentoj aŭdiĝas. Unu ĉefa estas, ke la tuta laboro estis farita de la Lionanoj kaj Tony kaj do estus normale, ke la liona grupo ricevu parton de la mono, kiu cetere jam estas pli-malpli atendata por ilia projekto KoToPo (legu poste en ĉi-raporto). Malpora argumento atentigas, ke JEFO ankoraŭ ne estas multana asocio, kaj ni ne komencu disdividi ĝin en diversajn grupojn kaj lokajn agadojn. Fine, post voĉdono (6 voĉoj poraj), alprenita estas la decido disdividi la profiton en tri partojn:


➤ Unu triono por mon-rezervo por eventualaj malprofitoj de ontaj aranĝoj (FESTO, gastromiaj semajnfinoj), kun maksimumo de 10000 frankoj.

➤ Unu triono por reklam-buĝeto de JEFO.

➤ Unu triono por la loka grupo.

Post tiu decido, Olivier (kasisto) prezentas la financon situacion de JEFO [*La red.: vidu poste la financon raporton*]. Por la venonta jaro, proksimume 9000 frankoj estos elspezeblaj (t.e. krom mono eventuale investita kaj poste rehavita, ekzemple: aĉeto kaj vendo de T-ĉemizoj).

Laŭ interkonsento inter UFE kaj JEFO, en la 1995-septembra komitat-kunveno de UFE, UFE redonu al JEFO la tuton el la junulaj kotizoj, tamen tio ne estis farita antaŭ 1996. Antaŭe, nur 40% estis redonitaj: UFE do ŝuldas monon al JEFO. Pri tio la JEFO-kasisto skribos al UFE.



▲ Homoj eklaciĝas post pluraj horoj da diskutado!

Konkurso de UFE:

UFE proponas, ke JEFO-ano estu ano de komisiono, kadre de tiu konkurso. JEFO devas elekti kandidaton. Alain pretas por tio.

Mapo pri la francaj Esperanto-kluboj:

Diversaj listoj jam ekzistas, i.a. la kurslisto farita de J.-L. Texier por UFE kaj aperinta en la septembra numero de la UFE-bulteno **Franca Esperantisto**. Bedaŭrinde, tiu kompilaĵo enhavas multajn erarojn aŭ/kaj mankojn: pri ili kulpas la grupojn mem, kiuj sendas (aŭ ne sendas) la informojn.

Ekzistas ankaŭ listo ĉe minitel **3615 ESPERANTO**, tamen ankaŭ tiu listo enhavas mankojn, kaj cetere ĝi listigas ĉefe kontakt-nomojn kaj preskaŭ neniun kurson.

Komputila listo de membroj kaj kontaktuloj:

Alain kaj Olivier prezentas sian ĝis nun faritan laboron, t.e. listigo de la bezonoj, por ke estontece (ĝis Septembro 1998), JEFO havu ilon sufiĉe potencon por administri milojn da membroj, kontaktoj diversaj, k.t.p. La laboro nun farita de Laurent tiam povos esti multe pli rapide kaj efike farita. Tia ilo ankaŭ helpu al pli trafa sendado de abonfin-avertoj, reklamiloj, ktp.

Ĝis tiam, en la nuna listo povos esti ĝisdatigataj multaj informoj. Ja multegaj nomoj kaj adresoj estas listigitaj, sed plejmulto el ili estas ĝisdatigindaj aŭ eĉ forĵetindaj, ekz. homoj al kiuj estis unufoje sendita reklamo pri Esperanto antaŭ pluraj jaroj, sed kiuj neniam vivsignis! Aŭ eksa membro de JEFO, antaŭ 10 jaroj, kiu transloĝiĝis, ktp. Propono akceptita estas, ke ĉiu komitatano mem alvoku la tiajn listigitajn homojn en sia regiono, kaj poste raportu al la sekretario pri ĝisdatigendaĵoj, pri ĉu indas konservi tiun adreson, ktp.

Laurent informas pri la sciigoj aperontaj en la venonta UEA-jarlibro. Decido estas farita aldoni la TTT-adreson. La faksnumero de JEFO nun estos tiu de Tony (02 99 35 09 44).

★ RENKONTIĜOJ

Venonta FESTO:

La ideo okazigi ĝin en Grezijono nun estas tute forbalaita pro almenaŭ tri ĉefaj kialoj, sekve de decido de la Grezijona komitato:

➤ La maksimuma nombro de partoprenantoj ne superu 90 (inkluzive la tendumontojn, pro sekureca preteksto).

➤ Ne vera koncert-ebleco malantaŭ la kastelo (ne sufiĉe potencaj elektraj instalaĵoj).

➤ Neniu vera (t.e. neprovizora) renovigo de la naĝejo (malgraŭ ideo de JEFO starigi printempan laborbrigadon por ĝin renovigi).

Universala kongreso 1998:

Bruno zorgos pri la rilatoj kun la amaskomunikiloj, kaj do ŝatus, ke iu alia JEFO-komitatano zorgu pri la junulara programo de tiu UK.

Ĉu JEFO okazigu FESTOn samjare? Tuj aŭ post la UK? Aŭ ĉu kromnombri la junularan UK-programon **FESTO**? Ĉiu-kaze, ĉiuj (komitatanoj, JEFO-anoj aŭ ne-anoj) estas invitataj anonci al Bruno ideojn de junularaj programeroj: ekskurso, ktp. Jam certe antaŭviditaj estos ĉiunokta diskoteko kaj trinkejo.

Gastronomiaj renkontiĝoj:

Pro la sukceso de la pasinta (kaj unua) Ĉokolada Semajnfino kun tri eksterlandanoj (ili tamen ne venis en Francion speciale por tio!) kaj la kontentiĝo de la senescepte ĉiuj 17 partoprenintoj, nun estas firme decidite okazigi pliajn tiajn aranĝojn.

➤ La venonta estos Fromaĝa Semajnfino, kiu okazos ankaŭ en regiono de Grenoble, la unuan semajnfino de Aprilo 1997 (samtempe kiel la regiona kongreso).

➤ La sekvonta estos Ĉokolada Semajnfino, komence de somero 1997.

➤ La sekvonta estos Fiŝa Semajnfino en printempo 1998, en Montpellier. Tiuj dato kaj loko estas elektitaj, por samtempe prepari la junularan UK-programon.

Teorie, decidite estas okazigi unu Ĉokoladan Semajnfino ĉiujare, kaj inter ĉiuj, unu alian: fromaĝan, ... sed jam tiom multas la ideoj, ke eble okazos Krespa Semajnfino en Bretonio!

OKEJ:

OKEJ estas Okcident-eŭropa Konferenco de E-Junularoj. La venonta okazos en Parizo la unuan semajnfino de Junio. La partoprenantoj eksterlandanoj tutprobable gastos ĉe la Pariz(-region)aj PS-anoj.

Projekto de esperantista trinkejo **KoToPo** en la centro de Liono:

Ĝi celas esti ilo de diversaj asocioj, lionaj, tut-francaj kaj internaciaj, por disvastigi Esperanton. Konkrete, la celo estas starigi veran koncert-trinkejon (en la franca: *café-concert*) kun internacia dimensio. Tio tutprobable estos unika en la historio de Esperanto. Kvin tagojn semajne, ĝi pruvos, ke Esperanto vivas. Tie eblos aŭdi E-muzikon, fojfoje spekti koncertojn, informiĝi pri Esperanto, ktp. Sed ĝi estos ankaŭ loko, kie la diversaj kulturoj (kaj ne nur la franca kaj uson-angla) povos sin esprimi. KoToPo celas fariĝi renkontiĝejo por eksterlandanoj loĝantaj en Liono: studentoj, gastlaboristoj, turismumantoj.

En KoToPo, E-o estos nek devigata esprimo regata de malplimulto, nek fora priparoladata idealo: ĝi simple estos, apud la franca kaj aliaj, lingvo uzata, vivanta pruvo de nia solvo al la lingva problemo. La esploroj pri tiu projekto jam estas farataj kaj ĉiuj homoj interesataj por partopreni en ĝia financado, por disvastigi la informon, ktp. povas ricevi pliajn informojn rekte el:

Guillaume Lanier, 18 rue
Imbert Colomès, 69001 LYON.

Por helpi al la realigado de
tiu projekto, la komitato decidas
bloki 8000 frankojn ĝis
novembro 1998.

★ REKLAMADO

*Expolangues 97 (29 Jan - 02
Feb 1997):*

Esperanto estos reklamata
en 2 budoj! En unu, kiun zorgos
UFE, kaj en dua, kie deĵoros
junuloj el JEFO. Pariza
komitatano (Philippe) zorgos pri
la listo de deĵorontoj, ktp.

Buĝeto por la salonoj:

Akceptita estas la propono
denove enmeti 500 frankojn en
la kason "salono" de INSULE
(neformala organizo de ĉiuj
Pariz-regionaj asocioj kaj
grupoj)

T-ĉemizoj:

100 pliaj ekzempleroj de
"3615 E-o ou tard..." estos
menditaj. Nova modelo: kelkaj
proponoj estas montrataj al la
ĉeestantaro, sed neniu ricevas
unuaniman aprobon. La afero
estos plu esplorata.

Filmo:

Ciro Gomes de Freitas,
profesia ĵurnalisto de la Brazila
televido kaj eksa prezidanto de
BEJO (Brazila E-Junularo)
restadis dum du monatoj en
Eŭropo por fari reportaĵojn.
Krom sia laboro, li realigis la
oficialan filmon pri la UK por
UEA kaj unu filmon por KEF.

Sekve de lia propono fari
filmon pri la IJK kaj pri la junaj
esperantistoj, (propono rifuzita
de TEJO pro monkialoj), JEFO,
GEJ, USEJ, kaj IEJ (t.e. la E-
junularoj franca, germana,

usona kaj itala) decidis mem
financi tiun filmon kaj poste
disvendi la kopiojn. La kostoj
estos proksimume 1000 frankoj
por ĉiu asocio. (Ĉiuj elspezoj
kaj enspezoj estos dividitaj
inter la 4 asocioj).

La ricevota kasedo estos
tute en Esperanto, kun nur
subtitole la nomoj de la
intervjuitoj. Post ricevo,
necesos ĝin subtitoligi en la
naciajn lingvojn kaj fari kopiojn.
Do nun estas serĉata homo, kiu
havus solvon ne tro koston por
subtitoligi la kasedon. Anoncu
vin!

JEFO-Butik':

Kio estas forigenda? Kio
plej bone vendiĝas? Al tiu dua
demando respondas Olivier: la
T-ĉemizoj, Asteriks-albumoj kaj
Vinilkosmo-kompilaĵoj.

Folioj por retroprojekciiloj:

Temas pri materialo
(lumfolioj, ~~franc~~lingve: *transpa-
rents pour rétro-projecteur*)
uzebla de studentoj aŭ
prelegantoj, por prezenti
Esperanton. La temoj de ĉiuj
folioj estas similaj al tiuj de
stando-paneloj.

Tiujn foliojn nun estas
faranta René Ballaguy. Ili
kostas po 15 frankojn.

Philippe prezentas kelkajn
jam faritajn. JEFO povus aĉeti
kelkajn kaj tiel krei prezent-
dosiero(j)n, pruntebla(j)n de la
JEFO-membroj, kiuj intencas
prepari lernejan prezentadon
en kurso, prezenti la lingvon al
publiko,...

Afiŝoj:

Philippe montras la afiŝojn
de la TEJO-dorsosako. Ili estas
sentekstaj kaj bluaj, kun foto de
knabina vizaĝo. Sube estas
libera spaco, kien oni povas
skribi (aŭ fotokopii) lokajn
informojn: anonco pri kurso,
ktp.

Bruno prezentas la belajn
oranĝ-ruĝ-blu-kolorajn afiŝojn
uzatajn en Liono. 600
ekzempleroj kostis 2000
frankojn.



▲ Feliĉe, poste ĉiuj iras babili en apudan restoracion!

Laurent montras la afiŝojn kiso faritajn de la Svisa E-Junularo, kun la sama bildo videbla sur la reklamilo "Le meilleur moyen de goûter aux langues étrangères". Tiuj nigra-blankaj sentekstaj afiŝoj estas fotokopieblaj kun iu ajn teksto.

Bulteno JeunEspéranto-INFO:

En 1995 aperis nur 4 numeroj kaj oni tiam atentigis Laurent, ke kun la 4a numero, li aldonu letereton atentigantan la ricevonton pri la fino de la abono. Tion li ne faris, atendente la 6an numeron! Sed en 1996 aperos nur 5 numeroj [La red: fakte nur 4] kaj oni denove atentigas Laurent, ke li aldonu leteron pri abon-fino, sen atendi 6an numeron! Tion li faros.

Gravan elspezon konsistigas ankaŭ la sendado de la bultenoj (kun aŭ sen la eŭropaj bultenoj **Koncize**). UFE konsentas pri sendado de la JEFO-bultenoj, kiel suplementoj al la UFE-bulteno **Franca Esperantisto**. Laurent esploras pri kiel konkrete realigi tion. Tiel la prezoj estos tre malgrandigitaj.

Internet:

Marc prezentas paperan version de la nunaj JEFO-TTT-paĝoj. Li klarigas pri sia jam farita (kaj farota!) laboro, informas pri kelkaj statistikoj. Ekzemple, 50 homoj (entute) aliĝis al la 2 proponitaj kursoj **Gerda malaperis kaj Cours Gratuit d'Espéranto**. El la 50, 20 komencis efektive la kurson, kaj ĝin finis 3. La nombro de aliĝoj multe kreskis post la publikigo de la artikolo en *Libération* (sed ne tuj).

Plia rimarko estas, ke komence de Julio, do t.e. post la studenta ekzamen-periodo, la aliĝoj rapide kreskis, kaj fine de Aŭgusto malkreskis. Oni faru reklamon pri la TTT-paĝoj, sed ne por la kurso ĉar mankas korektantoj (nun nur Marc!).

Tony kaj Alain surpaperigis la Internet-kurson kaj montras dumkunsido siajn laborojn.

Nova kolora reklamilo:

Bruno prezentas provaĵon faritan de eks-kolegino lia. Surbaze de la teksto de la kolora reklamilo de GEJ, ŝi tute refaris novan reklamilon pli grandan. Granda avantaĝo, se la reklamilon preparos ŝi, estas ke tion ŝi tutprobable bonvolemlule faros.

Broŝureto:

Tony preparis broŝureton, kiu koncize prezentas ĉiujn aspektojn de Esperanto: unu paĝo pri la revuoj, alia paĝo pri radio, alia pri la venontaj renkontiĝoj, ktp.

La koston de tiu broŝuro povus surprizi UFE, kadre de sia komisiono pri informado, ĉar temas pri ĝenerala prezento, kiu celas ne nur junulojn sed ĉiuaĝan publikon.

Pri mankoj kaj eraroj en la broŝuro donos sian opinion la JEFO-komitatoj kaj ankaŭ la membroj de la UFE-komisiono. Tiu broŝureto ne estos "luksa" ĉar ĝi devos esti ĝisdatigita ekz. ĉiun sesan monaton.

Malnovaj reklamiloj:

Ili kompreneble estos plu uzataj ĝis elĉerpiĝo.

Resume kaj tutprobable jam skribite en tiu protokolo, (sed pli bone estas ripeti denove!) se vi bezonas plian informon, materialon, ktp., havas ideon, helpproponon, skribu al ni.

Laurent

Le conseil d'administration de JEFO s'est réuni en novembre dernier pour discuter de différents thèmes concernant l'association. En voici un bref résumé :

• Finances :

JEFO se porte bien financièrement. Une solution a été proposée et adoptée pour répartir le budget de FESTO 96.

• Rencontres :

La prochaine FESTO ne pourra pas avoir lieu au château Grésillon comme annoncé initialement.

Suite au succès du week-end chocolat, il a été décidé de réaliser plusieurs week-ends sur la même formule pour 97 et 98.

Un projet est en cours : la réalisation d'un café-concert espérantophone à Lyon.

• Communication :

Deux stands espéranto seront présents sur le salon Expolangues 97 à Paris.

Un nouveau T-shirt est en cours de préparation.

Un film promotionnel a été réalisé sur les rencontres de cet été.

Un cours supplémentaire est dorénavant en place sur notre serveur Internet.

De nouvelles brochures d'information sur JEFO sont en cours de réalisation.



Pendant le week-end « fromage » à Grenoble les 4, 5 et 6 avril prochains, se tiendra l'Assemblée Générale de JEFO.

Prenez part aux discussions, ou si vous voulez faire partie du Conseil d'Administration ou du bureau, envoyez vos candidatures.

Financa raporto 1996




Elspezoj		Enspezoj	
Revuoj	14 481,80	Kotizoj	26 642,00
		- membroj de JEFO	19 662,00
Kotizoj TEJO/UEA	2 820,00	- membroj de TEJO/UEA	2 820,00
		- JI-aligoj	1 220,00
		- donacoj	2 940,00
Aĉetoj	6 252,66	Vendoj	8 759,00
- Pasporta Servo	811,70	- Asteriks	2 340,00
- trinkaĵoj	182,55	- T-ĉemizoj	2 520,00
- KDoj/kasedoj	2 950,00	- trinkaĵoj	793,00
- JEFO-dosierujoj	1 543,70	- Pasporta Servo	220,00
- komiksoj de Arnaŭ	421,00	- libroj	206,00
- skribiloj kaj aliaj varoj	343,71	- diversaj	720,00
		- logopingloj	35,00
Repagoj	1 905,00	- KDoj/kasedoj	1 140,00
- komitatanoj	1 000,00	- JEFO-dosierujoj	720,00
- diversaj	905,00	- komiksoj de Arnaŭ	65,00
Reklamado	780,00	Kongresoj	13 875,00
- budoj	500,00	- FESTO	13 875,00
- fotokopioj	80,00		
- "Maison de l'Europe"	200,00		
Diversaj elspezoj	296,00	Diversaj enspezoj	321,50
- bankokostoj	296,00	- ricevataj sendokostoj	296,50
		- diversaj	25,00
Pozitiva saldo ■■■■■■▶	23 062,04		
Entute	49597,50	Entute	49597,50

Olivier



Kristnaska mesaĝo de la kroataj infanoj



Message de Noël des enfants croates



Plej junaj membroj de Kroata Esperantista Unuiĝo, kursanoj en la bazlernejoj okaze de Kristnasko kaj Novjaro direktas ĉi-mesaĝon al siaj samaĝuloj tra la mondo.

KARAJ SAMAĜULOJ,

Pluraj samaĝuloj en nia lando suferis dum la militaj jaroj. Infanoj kiuj restis sen patroj, hejmoj, parencoj, plej bone scias kaj memoras la teruraĵon nomita milito.

Ni ne deziras ke iu ajn en la mondo plu suferu pro ĝi. Ankaŭ ni ne deziras militon en niaj ludoj, ni ne deziras "militkapti" kaj "mortigi" niajn amikojn dum niaj ludoj. Ni deziras pacon dum ludado, pacon en la mondo.

Ni invitas vin, ke ankaŭ vi forĵetu militludilojn.

SAMAĜULOJ,

Ni kune invitu niajn gepatrojn ke ili pli da tempo pasigu kun ni, ke ili ne provu aĉeti amon donacante militludilojn. Ili ebligu al ni pacan kaj senzorgan infanaĝon dum kiu ni povus ekkoni kulturajn kaj naturajn beloĵojn de niaj kaj aliaj landoj.

Ni ankaŭ invitu ŝtatestrojn, ke ili aŭskultu niajn voĉojn kaj finance malapogu tian industrion kaj vendistojn.

Finante ĉi-mesaĝon, ni deziras al ĉiuj Feliĉan Kristnaskon kaj pacan Novjaron en varmaj hejmoj kun senlima gepatra amo.

Zagrebo, Decembro 1996

Junaj membroj de
Kroata Esperantista Unuiĝo



Les plus jeunes membres de l'Union Espérantiste Croate, élèves d'écoles primaires, profitent de Noël et du nouvel an, pour adresser ce message aux enfants du monde entier.

CHERS ENFANTS DE NOTRE ÂGE,

Plusieurs enfants de notre pays ont souffert durant les années de guerre. Des enfants restent sans parents, foyer, famille, ce sont eux qui savent et se souviennent le mieux de l'horreur appelée guerre.

Nous ne désirons plus que quiconque dans le monde continue à en souffrir. Nous ne désirons pas de guerres dans nos jeux, nous ne désirons pas « capturer » et « tuer » nos amis lors de nos jeux. Nous désirons la paix pendant nos jeux, la paix dans le monde.

Nous vous invitons à rejeter, vous aussi, les jouets guerriers.

ENFANTS DE NOTRE ÂGE,

Ensemble, invitons nos parents à passer plus de temps avec nous sans essayer d'acheter notre amour en donnant des jouets guerriers. Qu'ils nous permettent d'avoir une enfance paisible et sans soucis, pendant laquelle nous pourrions découvrir les beautés culturelles et naturelles de notre pays et de tous les autres.

Nous invitons aussi les chefs d'États à écouter nos voix et empêcher cette industrie et ces vendeurs.


Pour finir ce message, nous vous souhaitons à tous un joyeux Noël et une nouvelle année de paix dans un foyer chaleureux avec l'infini amour de vos parents.

Zagreb, décembre 1996

Les jeunes membres de
l'Union Espérantiste Croate

Atentigoj :

- Via aliĝo estas transdonebla al alia persono, se vi skribe anoncas tion. Ni alĝustigos la kotizon kiu ne povas malaltiĝi.
- Eksterlandanoj povos pagi surloke por ŝpari bankokostojn.
- Tiu kiu malaliĝas antaŭ la 20-a de marto rericevas sian pagon minus 60 FRF. Post tiu dato, la kotizo ne estos repagebla.
- La Duan Informilon vi ricevos ĉirkaŭ la 20-a de marto.
- Akceptado vendrede la 4-an de aprilo ekde la 17-a horo.
- La organiza teamo ne respondecos pri spontanaj frandadoj sed nur pri organizitaj frandadoj, kiuj okazos je la 10-a kaj 16-a horoj (kun pano) kaj dum manĝoj (gastronomiaj pladoj).



FgS

Fromaĝa Semajnfino

4-6 aprilo 1997 • Organizata de JEFO


Grenoble • Francio

Aliĝilo

*JEFO denove okazigas
aranĝon en rodanalpa
regiono. De la 4-a ĝis la
6-a de aprilo okazos kun-
tema semajnfino :*

fromaĝoj en ĉiuj pladoj.

*Ĉiuj frenezuloj
renkontiĝos por frandi
fromaĝojn molajn, firma-
jn, aromplenajn, blujajn,
flavajn, blankajn, kun
ajlo, aromherboj, spicoj,
ktp. dum diskutrondoj,
vagadoj, kunsidoj, ludoj,
revoj...*



La Fromaĝa Semajnfino en kelkaj vortoj :



RECEPTARETO

Same kiel ni aranĝis por la Ĉokolada Semajnfino, publikiĝos la receptareto de la semajnfino. Viaj receptoj interesas ĉiujn frandemulojn. Vi do proponu ilin al la organizantoj por preparado dum la renkontiĝo.

Un livret de recettes sera édité à partir de vos propositions mises à l'épreuve.

FROMAĜO

Ni gustumados diversajn fromaĝojn aranĝitajn laŭ diversaj manieroj. Kiajn rilatojn havas la receptoj kun la regionaj kutimoj ? Kiun gravecon havas la fromaĝo en la regionaj receptaroj ? Ni jam prizorgas aranĝadon de la venontaj gastronomiaj semajnfinoj. Kiujn temojn ŝatas la frandemuloj ? Kie kaj kiam okazigi tiujn renkontiĝetojn ? Ni pridiskutos la politikajn aspektojn de la tradiciaj fromaĝoj. Kiel politikaj decidoj efikas sur aperon aŭ malaperon de fromaĝoj ?



Dégustations et préparations de fromages, planification des prochaines rencontres gastronomiques, importance du fromage dans les cultures régionales.

FESTO




Ni daŭrigos la preparadon de FESTO 97. Kiujn financajn rimedojn ni akiru ? Kiu kunhelpos dum disvolviĝo de la aranĝo ? Kion proponi en la kultura kaj distra programo ?

Ressources financières, préparation et programme de FESTO 97

JEFO

Ni certe pugnobatalos pri strategio por disvastigi esperanton. Ĉu ĉiuj esperantoparolantoj estu nur verbantoj kaj organizantoj ? Ĉu disvastigo de esperanto dependas nur de gastronomiaj semajnfinoj ? Kiel ni kunlaboru translime ?

Stratégie de communication pour la diffusion de l'espéranto, actions des espérantophones...



KTP

Kaj se vi ne deziras diskuti iun temon, vi povos vagadi surborde de la torento Drac, kuiri en la renkontiĝejo, ludi en la parko... kaj frandi fromaĝon dume !

Aliĝilo :

Familia nomo : _____

Persona nomo : _____

Adreso : _____

Urbo, poŝtkodo kaj lando : _____

Tel. : _____ Retadreso : _____

Sekso : ina malina - Naskiĝdato : _____

Vegetaran-in-o : ne jes - Pezo antaŭ FgS : _____ kilogramoj

La tuta semajnfino inkluzivas la matenmanĝojn, la sabatan kaj dimanĉan tagmanĝojn, la vendredan kaj sabatan vespermanĝojn, du tranoktojn (4-5 apr. kaj 6-7 apr.) kaj provizadon de fromaĝo !

baza kotizo 330 FRF

kotizo por studentoj, senlaboruloj, naciservantoj... 280 FRF

se vi aliĝas post la 15-a de marto, aldonu 60 FRF

Vi ankaŭ povas rezervi :

la dimanĉan vespermanĝon 35 FRF

trian tranokton (6-7 apr.) 70 FRF

Dato kaj subskribo :

SUMO : _____ FRF

Tuta pago aŭ minimuma antaŭpago de 100 FRF al "JEFO LYON" per ĉeko aŭ mandato al : CCP (PoŝtGirKonto) 8.929.15 H - Lyon.

Resendu tiun aliĝilon kun via pago al **Pascal LECAILLE B.P. 3019 FR-69394 Lyon Cedex 03** • Tel+Faks : +33 (0)4 72 36 07 14.

Retadreso : Alain.FAGOT@imag.fr (Alain Fagot) kaj
pascal@zen.dedal.fr.net (Pascal Lécaille)

Grave :

Indiku se vi venos : aŭte ; trajne ; alimaniere : _____

Dato kaj horo de via alveno : _____

kaj de via foriro : _____

Pri alventempo ne vere gravas krom se estas post la 20a.

Cetere estas regule busoj.

FgS



> Kurso por komencantoj

(Cours pour débutants)

Leçon n°1

À partir de ce numéro, nous vous proposons un cours pour débutants en dix leçons. Il s'agit du cours déjà diffusé sur Internet sous le nom de CGE (Cours Gratuit d'Espéranto).

Si vous êtes impatients et ne pouvez pas attendre les prochaines leçons, vous pouvez trouver le cours complet sur notre serveur WEB (<http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo>) ou, si vous n'avez pas accès à Internet, vous pouvez commander la version papier en écrivant directement au siège de JEFO et en joignant cinq timbres au tarif normal afin de couvrir les frais d'envoi et de photocopies.

Si vous avez besoin d'aide pour corriger tout ou partie des exercices ou tout simplement pour répondre à des questions que vous vous posez ou éclaircir des points que vous n'avez pas compris, écrivez-nous et nous vous proposerons un correcteur.

En espéranto les mots s'écrivent phonétiquement, c'est-à-dire qu'ils s'écrivent comme ils se prononcent (et vice versa).

Les lettres suivantes ont une prononciation différente du français :

c : ts (tsar)	ĵ : j (je)
ĉ : tch (Tchécoslovaquie)	o : o (bol)
e : entre é et è	r : de préférence roulé
g : g (gant)	s : ss (santé, suisse)
ĝ : dj (Djibouti)	ŝ : ch (chaud)
h : h (have en anglais)	u : ou (tout)
ĥ : hr (juan en espagnol)	ŭ : w (wapiti)
j : y (yogourt)	

Les autres lettres de l'espéranto (a, b, d, f, i, k, l, m, n, p, t, v, z) se prononcent comme en français. Les lettres q, w, x et y n'existent pas.

Chaque voyelle (a, e, i, o, u) forme avec les consonnes voisines une syllabe séparée. Par contre, j et ŭ, qui sont parfois appelées « demi-voyelles », sont des consonnes normales en espéranto, et font donc partie de la syllabe définie par une voyelle

voisine. Vous trouverez des exemples plus tard dans les leçons à venir.

Les noms communs et les noms propres finissent toujours par -o.

Les verbes à l'infinitif finissent toujours par -i.

Les adjectifs finissent toujours par -a et se placent normalement avant le nom qu'ils qualifient.

amiko : ami amika : amical esti : être
nova amiko : un nouvel ami
sana knabo : un garçon en bonne santé

Nous utilisons des caractères soulignés pour indiquer que l'avant-dernière syllabe porte l'accent tonique, c'est-à-dire qu'on la prononce plus fort que les autres syllabes. En français l'accent tonique est sur la dernière syllabe, aussi pour prononcer correctement amiko, il suffit de prononcer d'abord le mot français « ami » puis de lui ajouter « ko ».

Les pronoms personnels sont :

mi : je	ni : nous
vi : tu (ou ci, peu usité)	vi : vous
li : il (personne)	ili : ils, elles
ŝi : elle (personne)	oni : on
ĝi : il, elle (non-personne)	si : soi-même

On emploie li pour les personnes de sexe masculin et ŝi pour celles de sexe féminin. On peut étendre cet usage aux animaux familiers mais, à part ces derniers, on utilise ĝi pour désigner les objets, les pays, les animaux, les concepts abstraits... bref tout ce qui n'est pas une personne. Au pluriel, ili s'applique aux personnes des deux sexes et aux non-personnes pareillement.

Prononcez-vous ŝi et ĝi comme il faut ? Regardez bien la table en début de leçon.

Au présent les verbes remplacent leur terminaison -i par -as à toutes les personnes.

mi estas : je suis	ni estas : nous sommes
li estas : il est	vi estas : tu es, vous êtes

ŝi estas : elle est ili estas : ils, elles sont
ĝi estas : il, elle est

